# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

lundon, la 6-an de Julio, 2015 • numero sep


## Kio okazos hodiaŭ?



★ **8:30 –12:15 atm**
**Lecionoj en *Flowe***

★ **2:00 – 3:15 ptm**
***La Espero***
**en Flowe**
Guadalupe VEGA prezentos programeron pri la himno *La Espero*, kaj pri societo kiu instigas homojn parkere lerni ĝin.

★ **3:15 – 4:30 ptm: *La ora nombro***
**en Flowe**
Francisko LORRAIN prelegos pri la ora nombro, kiu gravas ne nur en matematiko, sed ankaŭ en biologio, muziko, kaj arĥitekturo.

★ **7:00 – 8:00: *Pri vulkanoj***
**en Flowe**
Ray REDD prezentos fotojn el siaj vizitoj al vulkanaj lokoj en la Kaskada Montaro.

★ **8:00 – 9:00: *Rakontoj de bestkuracisto* en Flowe**
Johano BENTLEY rakontos pri unu el siaj plej interesaj kaj strangaj spertoj en bestkuracado.


**La NASKa Fasko**
**Redaktejo: Finley 112**
<nask.esperanto@gmail.com>


La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:
<nask.esperanto@gmail.com>


# La ora nombro…

## *tra matematiko, biologio kaj arto*

*Francisko LORRAIN*



La ora nombro estas sufiĉe grava nombro, uzata en diversaj fakoj de matematiko, sed ankaŭ en arkitekturo, pentrarto, muziko kaj eĉ biologio! Tiun nombron malkovris la antikvaj grekaj geometriistoj, kiel rilaton inter diversaj partoj de geometriaj figuroj. Ekzemple, ĝi observeblas multloke en nia Esperanta kvinpinta stelo!

Pri ĉio tio mi parolos en prezentaĵo, kiun mi faros hodiaŭ posttagmeze. En ĝi mi tuŝos diversajn aspektojn de la temo – geometriajn, aritmetikajn, historiajn – kaj parolos pri foliaranĝoj ĉe plantoj, la pentraĵo *La Anunciacio* de Leonardo el Vinĉi kaj la pianosonatoj de Mozarto.

# Parkerigu *La Espero*-n

*Guadalupe VEGA*




Karaj geamikoj: Mi invitas vin veni kaj lerni ludante la Esperantan himnon *La Espero*.

Mi apartenas al la societo por parkere lerni la lingvon, kies prezidanto estas s-ro Hori JASUO.

Tiuj kiuj lernas parkere la himnon povas instrui kaj ekzameni aliajn. Vi ricevos senpagan atestilon el Japanujo. Mi atendas vin.

P.S. Ne temas pri kantado.

# *Travivulo* *de Ray REDD*

Jen bazo de arbo kiun mi fotis pasintlunde en najbara urbo. La arboj kiuj staras laŭ urbaj stratoj havas apartajn riskojn, inkluzive de kompaktigita tero, kolizioj kun motor-veturiloj, aerpoluaĵoj, kaj la ŝanĝemaj politikoj de urbaj registaroj. (La bela arbo starigita de pasinta generacio fariĝas "obstaklo al progreso.") Iel tiu ĉi arbo travivis. Evidente, kiam la arbo trolarĝiĝis por la strio inter strato kaj la trotuaro, la urbo malpavimis la trotuaron. Mi gratulas la arbon kaj la urbon pro tiu longa vivo.





*Arono kaj Ken foje muzikas en la duaetaĝa salono per violono kaj 12-korda gitaro. Oni diras ke Arono lastatempe riĉiĝis, ludante sian violonon sur trotuaro en Raleigh. (Foto fare de Makis DIRAS.)*




*En la kurso de Ĵenja oni lernas la plej utilajn vortojn. (Foto fare de Steven LIN.)*

# *En la lafokampoj*

*Ray REDD*

Jen pentraĵo kaj poezia komento pri tiu. La pentraĵo, *In the Lava Beds* ("En la lafokampoj") de Thomas MORAN estas de la fino de epoko kiam pentristoj akompanis esplorekspediciojn en la usonan okcidenton. Mia poemo estas produkto de hejmtasko.



© www.hudson-river-school.org

Forfuĝas tago. Rokoj, klifoj palas.
Griziĝas la koloro. Nokto falas.
La fajr' de kamp' eligas fortan fumon.
Ripozu vi, kiuj celas kapti lumon.

Kanjono de antikva malkvieto,
Nun lok' de komisi' de societo.
Rigardas vizitantojn ega ŝtono,
Okule per vizaĝo de bizono.

Ho, kia bela temp', esplorepoko:
Scienc' kaj arto en komuna loko.
Bedaŭrinde forpasos tiu stilo.
Pentriston eksmodigos la fotilo.

# Bestkuracistaj rakontoj

*Johano BENTLEY*

Mi laboras kiel bestkuracisto en Mobile, Alabamo. De tempo al tempo mi havas kazon, kiu estas pli stranga aŭ interesa ol la aliaj. Mi volas rakonti al vi pri unu el tiaj kazoj. Bonvolu veni por aŭskulti. La rakonto enhavas danĝeron, misteron, kaj eĉ ĉarman hundidon. Kaj kiu povas rezisti ĉarman hundidon?

